

Pri enhavo respondecas Jiřík Havlík, Plamínkové 12, Praha 7, t. 736-37

#### NOVA ESTRARO DE NIA KLUBO

La 15-an de oktobro 1958 okazis elekto de nova kluba komitato kaj elekto de nova prezidanto. La komitatanoj estas: Antonín Slanina, Jaroslav Šustr, Anna Bárochová, s-ano Kynčl, Ant. Seeman, Emil Rybinský, s-ano Lorenc, Jiří Havlík, Vladimír Pražák, Hedvika Goebelová, arĥ. Drlík, s-ano Zedník. Kiel nova prezidanto estis ĉiuvote elektita s-ano Jaroslav MAŘÍK. Lia adreso: Malá Štěpánská 9, Praha 2. Al ĉiuj funkcioj plenaj sukcesoj de ilia laboro.

#### VIZITE ĈE NIA KARA SAMIDEANO JAROSLAV ŠUSTR.

Post nesukcesa rifuzado konsentis fine nia modesta eksprezidanto respondi kelkajn demandojn por nia legantaro. Jen la esenco: 1. Kiam vi fariĝis Esperantisto? „En jaro 1917 dum la unu mondmilito; tiam mi vizitadis rondeton de esperantistinoj kaj la lingvon instruis min s-ino Šupichová. 1920 mi fariĝis membro de Esperantista Klubo en Praha, kiun gvidis Prof. Eiselt kaj tre baldaŭ mi jam estis komitatano.“ 2. Kiel longe vi prezidis nian klubon? „Tiu ĉi historio komencis 23.1.1931 kaj finiĝis la 24-an de septembro 1958 per mia rezigno – do entute 27 jarojn kaj 9 monatojn daŭris tiu epoko de mia vivo.“ 3. S-ano, bonvolu rakonti al niaj legantoj ion pri via agado en UEA. „Membro mi estis jam antaŭ la 13-a Universala Kongreso en Praha. Kiel delegito mi edziĝis (1927) kaj ekde tiu tempo mia kara edzino ĉiam fidele kunportis mian tutmondan zorgon (kuraĝa fianĉino, ĉu ne?). Ĉefdelegito mi fariĝis post la dua mondmilito; tiun funkcion mi transdonis al EAĈSR, kiu en ĝi daŭrigis ĝis fino de jaro 1950. En 1956 mi ree fariĝis ĉefdelegito kaj en la funkcio mi laboras ĝis nun.“ 4. Kiu sorto trafis la klubon dum nacista okupado? „Oficejo de Asocio estis fermita per nacistoj jam en 1940. En jaro 1944 gestapo ordonis al mi malfondi la klubon. Kiam mi alportis al ili deklaron pri malfondo de la klubo, ili demandis pri la mono. Sed senefike, ĉar mi simple klarigis ke, laŭ la statuto, tiu mono apartenas al tiama „Ústřední matice školská“. Nur pri nia ampleksa biblioteko mi havis grandan zorgon. Ĝi trovis krejon en kafejo LOUVRE. Ĝis la liberigo ni tamen ĉiuvendrede kunvenadis en la dirita kafejo (kontraŭe Metro), do fakte la klubo ekzistis senĉese.“ 5. Permesu demandon pri biblioteko: Kial ĝi estas nun ĉe vi? „En jaro 1951 fariĝis la klubo ano de OB2 kaj samtempe perdis sian kunvenejon kaj lokon por sia granda libero. La situacio estis malespera – kaj mi estis devigita savi tiun veran trezoron. Kelkfoje jam mi kaj mia edzino klopodis havigi iun novan ejon – vi bone scias – sed ĝis nun sen sukceso.“ 6. S-ano, estas fama via grandega korespondaro. Kiom da poŝtaĵoj vi ricevas? „Dum 1957 mi ricevis entute 4 200 poŝtaĵojn, t. e. diversaj sendaĵoj, sed ankaŭ respondendaj demandletoj. Rekordon akiris unu tago en 1958 kun 47 diversaj sendaĵoj.“ 7. Ni ĉiuj estas malfeliĉaj pro via rezigno. Bonvolu klarigi al ni, kial vi rezignis? „Mi opinias, ke nia movado bezonas freŝan sangon. La tutan vivon mi dediĉis al la klubo per nevidebla laboro, farante programon de kunvenoj. Dekojn da prelegoj mi faris kaj multe da materialo mi ankoraŭ havas; tiun prelegan aktivecon mi dezirus foje revivigi. Fakte mi ne rezignas, ĉar tiu malfortiga vorto ne povas ekzisti en vortaro de vera esperantisto.“ Kara samideano, ni ne emas sufiĉe esprimi dankon, kiun meritas via senlaca laboro por ni, por nia idealo. Estu sana, estu forta, estu ĉiam ĝoja kaj trankvila, estu ĉiam amata inter ni!

jmh

## **Praha-ek-1958-52-02**

BULTENO PRAHA 52-1958

- 02 -

ESPERANTISTA KLUBO en PRAHA kunvenadas ĉiumerkrede en Praha 2, Ve Smečkách 26, je la 20-a horo.

### **PROGRAMO:**

- 5. 11. Verda Ĉaro kaj Osvětová Beseda: „Ruĝa Oktobro“
- 12.11. A. Seeman: Kion oni povas montri al eksterlandano en Praha.
- 19.11. A. Slanina: Pri socia bonkonduito.
- 26.11. Eva Seemanová: Tradukoj.
- 3.12. R. Hromada: Lingva evoluo en Esperanto.
- 16.12. J. Staněk: Hinda vespero.
- 17.12. Adolf Bartošík: Esperanto-grafiko
- 24.12. kunveno ne okazos pro Kristnaska Vigilio
- 31.12. kunveno same ne okazos

La unua kunveno en nova jaro okazos la 7-an de januaro 1959.

ĈIUMERKREDE „VIVA GAZETO“; ĉefredaktoro: Emil Rybinski

NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ. Pro manko da spaco kaj pro longa neaperado de nia gazeto ni ne povas publikigi ĉiujn sciigojn kiuj meritas la mencion. Provizore ni estas devigitaj elekti. Bonvolu do pardonigi Mankou.

MORTIS. Ankaŭ ĉijare rikoltis la morto inter niaj vicoj. Forpasis du kunfonditoj de EK Pardubice, Růžena Veverková kaj Antonie Grossmannová, en Praha mortis konata samideano Jan Tauer, en Nymburk s-ano Josef Šilhart, fervojrevizoro. Ne povante dediĉi al ĉiu nekrologon, ni donas al ili helan memoron.

## **Praha-ek-1958-52-03**

BULTENO PRAHA 52-1958

- 03 -

GRANDA OKTOBRA REVOLUCIO. En plenigita salo de Osvětová Beseda en Praha 2 okazis la 7-an de novembro solena vespero ĉeĥlingva, kiun EK en Praha multnombre partoprenis, same kiel en pasintaj jaroj.

ESTONOJ KANTIS AL NI. Dum novembraj tagoj okazi sen multaj urboj de ĈSR kun granda sukceso koncertoj de la Ŝtata Akademia Ĥoro de la Estona SSR. Esperantisto jen diversaj urboj uzis la okazon ankaŭ por kontakti kun membro de la ĥoro, esperantisto s-ano Evald AAS.

DECEMBRA VESPERETO. La 6-an de decembro aranĝis la kluba junularo (nome: s-ano VI. Novotný) tradician Nikolaan vespereton kun gaja programo, bona dancmuziko kaj vera, alta, blankbarba Nikolao, kiu altveturis direkte el Esperanto-Ĉielo kunportinte multajn donacetojn por multaj niaj eminentaj precipe membrinoj kaj por kelkaj membroj. La vespero, kiun partoprenis ankaŭ multaj gastoj-eksterprahanoj, okazi sen bonega ejo de entreprena klubo BARABA sur strato Na Můstku, nur dank' al nerompigebla vigleco de nia kara samideano Vladimír Novotný.

DIVERSAJ SCIIGOJ. Aperis belega speciala eldonaĵo de Komitato por Turismo en Varsovio – multpaĝa plurkolora faldprospekto VARSOVIO INVITAS VIN. Sur bonega papero multaj bildoj kaj senerara

teksto informas vin pri ĉio, kio ligas vin kun urbo de viaj sopiroj, kun urbo de la Jubilea Kongreso. Demandu ĝin ĉe la Pola kultura centro en Václavské náměstí!

**OLOMOUC EN ESPERANTO.** 20-paĝa broŝuro riĉe ilustrita per desegnaĵoj kaj fotoj. Eldonis ĝin „Turista“ por regiona kunordiga komisiono por vojaĝtrafiko kaj turismo en Olomouc, mendebla estas ĉe: Turista-Ĉedok, Stalinovo nám., Olomouc, aŭ EK, Dr. Vladimír Mohapl, tř. Svornosti 4, Olomouc, Ĉeĥoslov.

**ESPERANTO-AFIŜOJN** ricevis la redakcio el Poděbrady kaj el Karlovy Vary. Ambaŭ sukcese varbis kursanojn por novaj kursoj, starigitaj dum oktobro. Dankon kaj deziron de plena sukceso al ĉiuj komencantoj!

Okaze de 130-jara jubileo de VÍTKOVICKÉ ŽELEZÁRNY eldonis la nomita nacia entrepreno desegnitajn poŝtkarton kun esperanta surskribo. Jen la modelo, kiun oni povus sekvi ankaŭ en Bohemio!

**LA JUNA KORESPONDANTO** – utila libreto de nia jam vere internacia aŭtorino Julie Šupichová, estis eldonita en septembro de la Asocio de esperantisto jen Pollando. Eldonkvanto 5 000 ekz., 20 paĝoj da modelaj frazoj por junaj komencantoj, kiuj deziras korespondi sen gravaj eraroj. Certe tiu ĉi broŝureto, kie prezo (3,20 Zł) estas tre malalta, trovos intereson ankaŭ ĉe niaj kursanoj, kiam ĝi estos aĉetebla.

**SOVETA ESPERANTO-LERNOLIBRO** aperis nun sub titolo: „Esperanto en 15 lecionoj“. Eldonis: Instituto de internaciaj rilatoj, en 200 000 ekz. Enhavo: 15 lecionoj kun ekzercoj; krestomatio de kutimaj tekstoj (prozo, poemaro, scienca literaturo, gazetaj elmontraĵoj, leteroj, ktp.). Aldono: Esp.-rusa vortareto. Ni kore gratulas al niaj sovetaj amikoj je ilia brila sukceso. La lernolibro estos aĉetebla en fremdlingva departemento de librovendejo KNIHA, Praha 2, Václavské nám. 42, kie oni vendas ankaŭ aliajn esperantaĵojn. Mendu ĝin tuj, antaŭ ĝia disvendigo!

**ESPERANTO POR RUMANOJ** – 32-paĝan lernolibron de esperanto eldonis Florian Paraschivescu, Craiova, Rumanio. Sinceran gratulon!

**JARLIBRO 1985** – Dua parto – ĵus aperis. Enhavas Gastronomian terminaron, kompilitan de nia s-ano Erhard Urban (knedlikoj = knedlíky). Raporto de la estraro informas, ke UEA havas nun 27 138 membrojn en 78 landoj. Tiu ĉi numero estus ege pli granda, se ne ekzistus obstakloj por pagado de kotizoj.

**TRIUMFA MARŜO DE „NUNTEMPA BULGARIO“.** Havante jam 11 000 abonantojn en 56 landoj de tuta mondo, tiu ĉi luksa gazeto komencos en 1959 aperi 48-paĝa, krom kovrilo. Ĝi estos presata per profunda kupropreso, multkolora kaj belarie, en 20 000 ekz.! Prezo por ĈSR Kčs 12,--! **ABONU TUJ, NE PROKRASTU!** Vian abonpagon sendu per poŝtmandato al E-klubo en Praha, Dlouhá 10, Praha I., aŭ abonu la revuon per simpla poŝtkarto, post kies ricevo ni sendos al Vi poŝtan transpagilon.

**BULTENO DEZIRAS AL SIAJ LEGANTOJ ĜOJAN KRISTNASKON KAJ FELIĈAN NOVAN JARON 1959, JUBILEAN JARON DE NIA MAJSTRO!**

NEKONATA LETERO DE ZAMENHOF

La malnovaj samideanoj en Praha memoras, ke antaŭ la unua mondmilito ekzistis en la kvartalo Smíchov, strato Plzeňská, drogejo kun granda butikŝildo: „Drogerie E s p e r a n t o“.

Ĝi apartenas al s-ro Josef Podlipský, prezidanto de la tiama Esperanto-klubo en Smíchov. Tiu ĉi samideano ne plu vivas. Sed inter liaj postrestintaj paperoj troviĝis ankaŭ interesa letero, kiun nun posedas nia honora prezidanto Jaroslav Šustr. Estas nedatita letero, kiun al s-ro Podlipský sendis L. L. Zamenhof kaj kiu ĝis nun ne estis konata al la publiko. La adreso tekstas: „Al s-ro Josef Podlipský, Plzeňská třída čp. 871 Smíchov Böhmen-Oesterreich“ kaj portas la poŝtan stampon de 19. 5. 1910. Jen la tuta teksto:

„Kara sinjoro! La saluton kaj fotografaĵon de Via grupo mi danke ricevis. „Ĝis“ montras, ke la movo jam finiĝis, tial la akuzativo ne estas necesa; ankaŭ „al“ estas superflua sekve: „mi akompanis vin ĝis la domo“ aŭ „mi akompanis ĝis antaŭ la domo“. „Scipovi“ kaj „povoscii“ havas la saman signifon; mi konsilas uzi ĉiam „povoscii“ (tia sciado, kia donas la povon ion fari). „Pasigu al mi la korbon“ oni povas diri; oni povas ankaŭ diri „alproksimigu al mi la korbon“. „Replike“ havas tute alian signifon ol re-plike kaj en tia senco ĝi ne povas esti uzata. „lu-rekten“ oni povas diri. L. Zamenhof.“

Ni vida, ke temas pri unu el la „lingvaj respondoj“, per kiaj la Majstro kompleze kaj afable reagadis al la senfinaj kaj senĉesaj demandoj de la esperantistoj. La skribo de lia mano estas rapidem, nefacile legebla, do tiu ĉi rutina ĉiutaga laboro lin evidente tre ŝarĝis. La antaŭlastan respondon ni komprenas tiel, ke s-ro Podlipský lin demandis, ĉu la vorto „replike“ estas analizebla kvazaŭ ĝi konsistus el tri memstaraj radikoj Re, Pli kaj Ke. La Majstro tion neis.

Pu.

ĈE LA GRIZHARA ESPERANTO Ints ĈAĈE.

(Traduko de artikolo aperinta en gazeto Rigas balss – Voĉo de Riga, La 19-an de marto 1958 en Riga, Latvia SSR).

Ĝi ne tute estis strato, nur arbara vojeto, kiu en Pumpuri nomiĝas prospekto de Kirov. Inter la sveltaj marbordaj pinoj estas kaŝita ne granda dometo, kie post kvindeko da jaroj pasigitaj en laboro, nun merititan ripozon ĝuas pensiuoj Ints Ĉ a ĉ e - linotipisto de la ŝtata modela presejo en Latva SSR.

Enirante lian laborĉambron vi surprize rigardas multajn librobretojn, sur kiu troviĝas pli ol 6 000 volumoj da libroj en 32 lingvoj. La pensiulo tamen asertas, ke ne temas pri io escepta, ĉar la esperantisto E. Bokarev Dro Prof. De filologiaj sciencoj en Moskvo en sia persona biblioteko havas librojn en pli ol 100 lingvoj de la mondo... Interese estas foliumi tiajn bibliografi ajn raraĵojn, kiel granda Rusa-Japana hieroglifa vortaro aŭ Historio de la artoj de Gnediĉ en tri volumoj. Surprizas unikaj libroj kun diaj kartonaj folioj, kie ni vidas neniun literon, nur punktsimilajn elstaraĵojn. En sia juneco Ints Ĉaĉe alproprigis profesion de instruisto por blinduloj kaj 40 jarojn ĝis hodiaŭa tago li restis amiko de blinduloj, zorgante pri lagaĵo por ili. Tamen plej multe de sia libera tempo li dediĉis al Esperanto, kiun li lernis dum siaj knabaj jaroj.

Jam en jaro 1909 Ints Ĉaĉe fariĝis membro de Latva Esp. societo, sed en jaro 1915 membro de unuiĝo de tutmondaj esperantistoj (UEA). Ĉe la refaldaĵo de lia vesto estas fiksita la insigno de esperantistoj – verda kvinpinta steleto sur blanka ronda butonsimilaĵo, kiun en Petrograd (nuna Leningrad) al li donacis mem la patro de Esperanto Dr. L. Zamenhof. Tiu ĉi varsovia okulkuracisto post 11 jaroj da laborado en jaro 1887 publikigis en rusa lingvo „Lingvo internacio“ subskribente ĝin per pseudonimo Dro Esperanto.

Rapide tiu ĉi internacia lingvo akiris amkojn en tuta mondo kaj nun la familio de esperantistoj nombras multajn milionojn. Jam en jaro 1889 ankaŭ en Riga estis eldonita la unua Esp. lernolibro por latuj de instruisto Rudolf Libek. En jaro 1892 en Peterburg fondiĝis societo „Espero“, kies sekretario Ints Ĉaĉe estis ek de jaro 1914 ĝis 1922.

Pasintjare la 3-an de decembro Ints Ĉaĉe estis invitita referi en Akademio de Sciencoj de USSR en, laŭ nomo de M Gorkij nomita, domo de sciencoj en Leningrad, kie li, inter alie, al la aŭskultantaro rakontis pri aliaj interesaj rememoroj, renkontiĝinte kun Lenn, kiu en jaro 1918 la 13-an de aprilo invitis al si en Smolnij, ĉambro 13-a, al pridiskuto la estron de „Espero“ Profesoron N. Devjatnin kaj Ints Ĉaĉe. La diskuton ĉeestis ankaŭ la ministro pri klerigaj aferoj A. Lunaĉarski kaj privata sekretario de Lenin. E. Drezen (lingvisto, Liepajano, eksprezidanto de „Espero“). Tiam Lenin rakontis, ke ankaŭ li en sia juneco troviĝante en eksterlando, lernis Esperanton laŭ lernolibro en 10 lecionoj de Cart kaj Panje en franca lingvo kaj dum la kongreso de 2-a internacio de Bruselo (la 18-an de junio 1914) siajn raportojn legis en lingvoj franca kaj Esperanto. Lenin iniciativ kunvoki Tutsovetian kongreson de esperantistoj, kiu okazis en jaro 1921 de 1-a ĝis 5-a de junio. Tie kolektiĝis 321 delegitoj (po unu delegito – reprezentanto de 300 oficialaj membroj). La lasta renkontiĝo de Ints Ĉaĉe kun Lenin okazi sen Kremlo-Moskvo en la jaro 1921 la 21-an de junio post ĉi tiu konteso

En la jaro 1922 Ints Ĉaĉe revenis Latvion kaj fariĝis pasia akcelanto de Esperanto-movado. Estis kursgvidanto, en jaro 1926 li eldonis propran lernolibron de Esperanto kaj en la jaro 1930 aperis de li en Esperanton tradukita tragedia verko de Janis Rainis „Amo estas pli forta ol morto“, kiu akiris legantojn en 83 landoj.

Nun dum sia vivkrepusko la grizhara esperantisto kun ankoraŭ pli granda entuziasmo zorgas, ke tiu ĉi internacia lingvo akcelu la interŝanĝon de kulturo de popoloj en tutmonda kaj lukton por la paco.

La kolektivo de latvaj eseprantistoj preparas materialon por la preso de Antologio de Latva literaturo kie estas reprezentitaj 29 aŭtoroj. Ints Ĉaĉe laboras, preparante Internacian Krestomation, kun specimenoj de folkloro de 123 nacioj.

Ni deziras al la grizhara pensiulo, kiun ne estas fleksinta la ŝarĝo de aroj kaj kiu teras pri sia senriproĉa sano, ankoraŭ multajn jarojn de produktiva vivo.

E. Egle

Esperantigis T. Arbergs en Riga la 20an de marto 1958.

Noto de la redakcio: s-ano Ints Ĉaĉe en sia letero de la 3-an de novembro 1957 al la Esperantista Klubo en Prah i. a. sciigas, ke lia Internacia Krestomatío enhavas ankaŭ tradukojn el raraj lingvoj indianaj (aborigema, azteka, gracia, atlaska, botokuda, gajda, karaiba, maja kaj ona-de indianoj sur Fajrtera arĥipelago), negraj (bantu, berbera, buŝmena, djolofa, galla, hotentota, kabila, kafra, kojskima, nana, senegala, sudana kaj zula) kaj nordamerik-eskimaj.

---

Kalocsay:

LA MESAĜO DE NAZIM HIKMET  
(fragmento)

Poeto Nazim Hikmet sidas  
por tridek jaroj en karcer'...  
La muroj ĉirkaŭ li mucidas,  
inter fenestra krad' el fer'.

Jen sian plejdolĉkantan filon  
Turkujo tenas en obskur',  
domaĝas al li la sunbrilon,  
domaĝas al li eĉ skribilon.  
Li skrapas versojn sur la mur'.

La skrapo muron ja ne fendas...  
Tamen, skrapeton post skrapet'  
li ungas: per la ungoj plendas,  
mesaĝon per la ungoj sendas  
el sia tombo la poet'....

Antaŭ dekunu jaroj alportis la gazeto Literatura Mondo salutpoemon de K. Kalocsay al la fama turka poeto Nazim Hikmet, kiu tiutempe estis enkarcerigita pro sia amo al la homa libero kaj pro sia kredo pri la progreso. Oni rakontis, ke la poeto senigite de ĉiuj ebloj, skribe interkomunikadi kun la mondo, elskrapadis per siaj ungoj versojn en la murojn de la karcerio.

Tiu tempo estas jam forpasinta. Nazim Hikmet vivas ja for de sia patrujo, sed li spiras liberan aeron kaj siajn mesaĝojn al la homaro devas plu elskrapadi per la ungoj. Liaj verkoj havas larĝan publikecon kaj liaj dramoj ĝuas renomon.

Unu el liaj ŝatataj teatraĵoj estas „Legendo pri amo“, konata ankaŭ el filma adapto ĉeĥa – bulgara. Ĉi tiun fabelan alegorion elektis la teatra grupo de la Esperanta-klubo en Praha „Verda Ĉaro de Julio Baghy“ kiel sian novan taskon kaj ĉe ties prezento pruvis sian artisman maturecon. La teatraĵon tradukis Eva Seemannová. Ŝi ankaŭ kreis la rolon de la reĝino Mehmene Banu, baraktanta inter sindona amo al la tenera fratino Ŝirin (Eva Řiháčková) kaj nesatigebla sopiro al la junece brava pentristo Ferĥad (Pavel Tichý). La reĝino ne hezitis oferi sian belecon por savi la fratinojn el la morto, sed per tio ŝi kaŭzis al si longjarajn suferojn, kiuj frakasis sian koron. La rolo prezentis al la aktorino eblecon neforgeseble elludi la tutan gamon de la sentoj, kiuj povas ekregi la virinan koron: la sinoferemon, ĵaluzon, ĉagrenon rezignon, venĝemon, sangavidon... Al sia fratino Ŝirin la aŭtoro preskribis rolon de pasiva knabino, dorlotata kaj amata, kiu – blindigita de siaj amsentoj – eĉ ne supozetas, kian suferon ŝi trudas al la reĝino. Kaj senvola la kaŭzo de la konflikto, la juna Ferĥad, ekaminte la belan Ŝirin, kvankam li estus povinta eksidi sur la trono ĉe l'flanko de la reĝino, kuraĝe kaj sentime batalas por la elektita virino, penetras en la haremon, fugas kun ŝi kaj – kaptite de la soldatoj kaj juĝate – akceptas kiel punon pro sia krimo superhoman taskon: trabori la Feran Monton kaj tiel alkonduki akvon en la urbon Arsen, kie senĉese pereas homoj je epidemioj.

Tagon post tago li batas la monton, dek jarojn, dek kvin jarojn ... kaj jen li sentas, ke li laboras ne por akiri la promesitan virinon, sed por savi la soifantan popolon. Kaj pluajn kvin jarojn li boras la rokojn, ĝis elŝprucas la savodona fonto, kiu ne nur alportas la sanon al la popolo, sed redonas ankaŭ la perditan belecon al la reĝino. Tamen eĉ tiel si ne akiras la amon de Ferĥad, kiu plenuminte la taskon, foriras kun sia Ŝirin.

Tiu ĉi historio de amoj estas enkadrita inter dufoja apero de misterplena migranto, kiu en dramece tre efikaj scenoj ludas rolon de la Fato, direktante la sortou de la homoj. Aktoris lin Tony Seemann, kiu ankaŭ reĝisoris la teatraĵon. Li elsorĉis per kostumoj kaj nemultaj dekoraciaĵoj kaj kurtenoj fean atmosferon de orienta fabelo, substrekitan ankaŭ per muziko el originalaj gramofondiskoj.

La sindonan, maljunan vartistinon de la reĝino ĉarme prezentis Arnoŝka Nývltová (Allah estu laŭdata...). Mirek Kalivoda estis sia ambiciema filo Eŝref kiu por malkaŝo de la sekreto de l' pentroarto helpis la malpermesitajn rilatojn de la geamantoj. Tre impona estis la figuro de la veziro (Dro Pravoslav Sádlo – Páv), kiu senespere amis la reĝinon, sekrete atendante, ke li eble povos edziĝi al ŝi kaj tiel mem fariĝi sultano, kaj senkaŝe malamis la junan paron, kiu ruinigis liajn planojn.

La ceterajn rolojn ludis Emil Rybinski (la zorgema patro de Ferĥad), Ladislav Kynĉl (la senkonsila kaj avara ĉefkuracisto) kaj Eliška Drapáková (sklavino). Reĝa haroldo, gvardianoj, viroj kaj virinoj el la urbo Arsen kompletigis la ensemblon de tiu ĉi pretendema, sed bone sukcesinta teatraĵo.

La ludo estis prezentata du fojojn: Al la unua vespero, kiu okazis la ...7-an de Majo, sendis la invitita poeto Nazim Hikmet ruslingvan leteron de la jena teksto:

„Karaj amikoj, mi dankas vin, ke vi tradukis mian teatraĵon en Esperanton. Mi bone scias, kion tio signifas por la aŭtoro. Ankaŭ mi kredas je Esperanto. Mi tre bedaŭras, ke mi ne povos ĉeesti la premieron, ĉar la 3-an de Majo mi forveturos el Praha kaj revenos nur antaŭ la fino de la monato. Sed mi ne rezignas la esperon, ke mi ankoraŭ aŭdos miajn heroin paroli la lingvon de la estonteco. – Kun saluto Via Nazim Hikmet pm.“

Praha la 28-an de Aprilo 1958.


La espero de la poeto plenumiĝis la 7-an de Julio, kiam la Verda Ĉaro prezentis la teatraĵon la duan fojon. Ankaŭ nun ĉeestis ĉirkaŭ 150 spektatoroj, pluraj e lili veninte el tre malproksimaj lokoj. Sed la plej ŝatata inter ĉiuj estis la poeto Nazim Hikmet mem, kiu post la unua akto suriris la scenejon kaj faris salutparoladon. Li tre alte aprezis la artisman nivelon de la prezentado; Laris la surprize belsonan lingvon (Esperanton li estis aŭdanta la unuan fojon, kaj rekonis la kuraĝon kaj persistemon de la esperantistoj, kiuj por idealo de malproksima estonteco ne hezitas oferi siajn fortojn.

Ni ceteraj, kiuj vidis la teatraĵon, ĝoje aŭskultis tiuj laŭdajn vortojn.

La bilanco de la aktiveco de la Verda Ĉaro estas gratulinde aktiva.

Pu.

## Krucvort-enigmo



### LEGENDO:

#### Horizontale:

A) Estona aŭtoro de bonega Esperanta gramatiko, B) Eŭropano, C) Kemia elemento, spaco trairata de movganta korpo/r/, prepozicio, D) Estaĵo de idonaska sekso, pronomo, E) Taŭga/r/, submetigi /r,rv/, F) Unuo de elektra rezistanco/r/, G) sufito, kuirvazo/r/, prepozicio, H) Mallongigo de novjorka radio korporacio, stato senlita, I) Porfiŝista orbo, J) Hungara jeso, K) AHH, diferenco inter la nominale kaj efektiva valoro de la mono, L) Mallongigo de unu el la usonaj ŝtatoj, ludkarto, sign opor sigelo, M) Metalor, N) Denove, patro de la patro, O) Muzika esprimo/r/, ŝuista materialo/r/, P) Membro, france „ĉi“, R) Kemia elemento, konstruaĵo/r/, konjunkcio, S) Percepti la bildojn de la objektoj, T) Artefarita lingvo.

#### Vertikale:

1) Kaŝita devizo, 2) Grava internacia organizo, mondfama Esperanta verkisto (kun mallongigo de la baptonomo), Esperanta asocio en Usono, 3) Itala rivero, pronomo, fama Esperanta instruisto, fruktiga substanco, roma numero kvar, 4) Sufikso, 5) Artefarita lingvo, sufito, kemia elemento, kokina produktaĵo (en adjektivo), 6) Konjunkcio, ĉeĥoslovaka junulara Esperanta cirkulero, numeralo, 7) -, 8) Lirika poemo/r/, mallongigo por latina esprimo „el ofica ordono“, konjunkcio, prepozicio, mita supernatura estaĵo /r/, 9) Bezonaĵo por kantistoj /r/, ano de la granda nacio, 10) Adverbo manĝi per malgrandaj pecetoj (en imperativo).

---

#### KORESPONDI DEZIRAS...

##### Ĉeĥoslovakio:

F-ino Marie JÁCHYMOVÁ, Švermova 360, Vimperk; bildkartojn, moden, kun tutmondo

S-ano Jaroslav MAREK, poŝtovicisto, Stalinova 195, Vimperk; bildkartojn, poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj

S-ano Zdeno MIKULECKÝ, Řepov 98, MLADÁ BOLESLAV; 17-jara, interŝanĝos PI kun ĉiuj landoj

##### SOVETUNIO:

S-ano A. A. SEMENOV JAROSLAVL, P/k 31; profesoro, literaturisto pri literaturo kaj ĵurnalista agado kun Ĉeĥoslovakio

S-ano Aldur JÄRVALT, str. Lahe 1, KINGISSEPP, Estonio, Sovetunio; 19-jara studento pri teĥniko, sporto, literaturo

##### BULGARIO:

S-ano Minčo Ev. ANĈEV, Lenin 169 KJUSTENDIL; 15-jara interŝanĝos PM kaj PK kun ĉiuj landoj

##### ROMANIO:

S-ano Mihail DUNGEANU, poŝtkesto 117, Orasul STALIN 1, Romanio; 28-jara fraŭlo kun ĉeĥoslovaka fraŭlino

##### POLLANDO:

F-ino Janina ŚMIETANOVSKA, str. Sienkiewicza 5/6, VARSOVIO; 21-jara oficistino pri filmo, fotografko kaj aliaj temoj kun geĉeĥoj

##### ĈINIO:

S-ano JANG ZUN-KUN, Ŭn De Len strato, Ĉu Zian parko n-ro 4, KANTON, Ĉinio; 21-jara studento kun esperantistino

##### JUGOSLAVIO:

F-ino Ivanka JERBIĈ, Marŝala Tita 11 VELIKI ORDŽEVAC, N.r. Hrvatska; 17-jara per PK kun tutmondo

F-ino Radmila ŽIVKOVIĆ, NOVA RAČA, N.r. Hrvatska; 17-jara per PK kun tutmondo

BULTENO – informilo de ESPERANTISTA KLUBO en PRAHA, rondeto de Osvětová Beseda en Praha 2. Adreso por korespondi: EK en Praha, Dlouhá 10, Praha I.

N-ron 52-an ilustris Dolf Bartošík.

A-o9154